



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,

Melbourne (Aŭstralio). —

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

ro 46

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 aprilo 1924

FINNISH PARLIAMENT'S SUPPORT.

The parliament of Finnland has again voted an amount of 25,000 finmarks for the teaching of Esperanto.

CZECHOSLOVAK RAILWAY DEPARTMENT FAVOURABLE.

Czechoslovakia is a country that is more and more visited by tourists, in spite of its unattractive name and its incredible-looking language, for its capital, Prague, is one of the most beautiful cities in Europe.

The Ministry of Railways there some time ago recommended to its officers the study of Esperanto. Recently the Ministry drew attention in its official journal to a Czech Esperanto phrase-book and grammar compiled for the use of railway officers, and recalled that for positions which a knowledge of foreign languages is required preference is given to candidates with a knowledge of Esperanto.

MILAN MUNICIPALITY AND ESPERANTO.

The Municipality of Milan has for long given practical support to the teaching of Esperanto.

Recently another course was opened, this time for teachers, and the councillor in charge of public instruction, Signor Stefano Conio, in reminding the teachers of the widespread use of Esperanto, said that the municipality was resolved to continue its support of the language.

QUAKER CONFERENCE AND EDUCATION.

A recent conference of Quaker teachers in England was addressed by Professor Collinson, of Liverpool, a strong supporter of Esperanto, on the subjects "International Language and Education" and "The Educational Value of Esperanto in Geography and History."

The teachers heard and were convinced; and already Esperanto has been introduced into the programme of the Senkelt Friends School.

"ESPERANTISTS, ANARCHISTS, ETC."

All too numerous are the people—and excellent people some of them, otherwise—who see in our movement, because it is an international movement, a menace to the state, to property and to the person. Since Es-

peranto has its roots in countries which were enemies in the past and in countries which may be our enemies in the future, and since anarchism, communism, bolshevism and other isms of which they disapprove are equally international . . . therefore Esperanto is utterly bad and its adepts are aiming at the overthrow of civilisation. The reasoning is not clear, but it is familiar. The war is five years past, but we are still pro-Germans (in Australia), pro-English (in Germany), "bourgeois" (in Russia), and bolshevists (in France).

It is refreshing to find at least one person in a high place, and a high military place at that, who is able to understand that a neutral means of communication such as the telegraph, the telephone, the marine code or Esperanto is not bad in itself even though it may be used for bad ends.

A number of persons in Cluj (Transylvania, Roumania) were some months ago arrested on a charge of communism, part of the evidence being that they were studying Esperanto. At the trial in the military court recently the president (Colonel Tucas) made the following declaration:

"As regards the Esperanto classes, the accusation cannot stand, since the study of Esperanto is a praiseworthy undertaking. I would have every man learn this language, and I would willingly learn it myself if I had enough time, for Esperanto is not only a useful accomplishment, but also an excellent civilising agent, by bringing men into closer contact with each other. But if anyone uses this language for forbidden ends, and if proof is found, then he is punished in the same way as for crimes committed in any other language."

The words of Colonel Tucas may be commended to the many people in our midst who readily attribute political and social aims to a perfectly neutral movement without taking the trouble to know the facts.

AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS.

Melbourne, 1925.

It seems a long way off, but it

isn't really. Only thirteen months. Only thirteen monthly council meetings. So it's not too soon to begin to THINK about it. The Melbourne section of the A.E.A. council at its last meeting fired the first gun and appointed Messrs. G. Redfern (congress secretary), H. Byatt and M. Hyde as a provisional committee with power to add.

The Executive Committee.

At a meeting of representatives of Melbourne groups held at the rooms of the A.E.A., the following gentlemen were elected a congress executive committee with full power to act:— Mr. Henry Byatt, and Mr. Roy R. Rawson.

The advisory congress committee consists of the following, with power to add: Mr. G. Redfern (Melbourne section of A.E.A.), Mrs. E. S. Bigelow ("Iru Antaŭen"), Miss Clarke (A.N.A., Oakleigh), Miss Naomi Byatt (Malvern Girls' Club Group) and Miss B. Adamson (Rationalist Group).

FESTO C'E OAKLEIGH.

La Melburna kvartalo Oakleigh de longe okupas honoran lokon en nia movado kiel centro de efika Esperanta agado. Oni do ne miras, ke la festo je la 25-a de marto organizita de la du tieaj grupoj: "Iru Antaŭen" kaj la grupo de la Asocio de Aŭstraliaj Ennaskitoj, havis grandan sukceson.

Aleŝtis anoj de diversaj Melburnaj grupoj, kaj en la agrable ornamita salono de Hanney ili ĝuis programon el kantoj de sinjoro kaj fraŭlino Macdonald, deklamoj de fraŭlino Rene Mitchell, violona ludado de sinjoreto Norman Bigelow, paroladoj kaj komuna kantado en Esperanto kaj . . . dancado. Plie, estis konkursoj: memorado, vortformado, k.t.p.

Entute, gajan kaj multe ĝuatan vesperon oni devas danki al la agemaj Oakleigh-anoj.

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.-K.—Sinjoro Frank V. Taylor, prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo, edziĝis kun samideanino, fraŭlino Adelaide Hughes, la 22-an de marto. Societanoj profitis la okazon donaci al la novaj geedzoj arĝentan manĝopladon, kun

konvena surskribo, kaj aŭtografan albumon enhavantan la nomojn de la anoj.

Al gesinjoroj Taylor, gratuloj kaj multe da jaroj de feliĉo!

TAGO DE PACO—TAGO DE DANKO.

Skribas sinjoro Kenji Ossaka en "La Revuo Orienta":

La Japanoj por ĉiam remoros kun kortuŝo la elmontron de la homar-anisma helpemo de ĉiuj nacioj en la mondo, donitan okaze de la terura kataklismo. Por esprimi la koran dankon, Japana Asocio por la Ligo de Nacioj aranĝis kunvenon de geknaboj. Komitatanoj de nia J.E.I. ankaŭ partoprenis en la laboroj preparaj kaj aranĝaj. La kunveno okazis en vastega, malfermita koncertejo de Hibija Parko, kiun jam je la 11-a h. plenplenigis amasego da urbanoj. Plej varman aplaŭdon altiris danksalutoj legitaj de geknaboj en la japana, angla, franca kaj Esperanta lingvoj. Estas tre notinde, ke la Esperanta legado farita de sinjoreto Hiroŝi Ŝimamura, lernanto de Seikei Liceo, tre sonore atingis aŭdanton starantan ĉe la plej malproksima angulo, dum la legado en aliaj lingvoj tie estis tute ne aŭdebla. La teksto estis:

„Ni, japanaj geknaboj, amantaj Pacon, kunvenis por festi la kvin-jaran datrevenon de la Repaciĝo. Estas al ni granda ĝojo, ke vi, reprezentantoj de diversaj nacioj de la mondo, ĉeestas ĉe nia kunveno en tiel granda nombro.

“Ni esprimas nian dankon al vi, kiuj montris al ni plej varman simpatian kaj donis multajn helpojn okaze de la kataklismo, okazinta la unuan de septembro.

“Ĉiam kun la homaraneco en la koroj kaŭzita de tiu ĉi universala amo, ni laboru kun vi por la bono de la tutmonda paco.”

Okaze de la festo la Asocio de

la L.N. presigis bildafiŝon kun Esj. frazo el “Kanto de Ligo”: Fratoj, manon donu kore.

Studentoj de la urbo aranĝis ĉi-okaze “tagon de dankantaj subskriboj.” Ili starigis tablojn en multaj lokoj de la urbo, por ke dankemaj preterpasantoj subskribu siajn nomojn. Kaj la tiel kolektitajn foliojn oni divide dissendas al diversaj landoj, kune kun dankleteroj en la Japana kaj Esperanta lingvoj. La teksto estas:

“Neesprimebla eetas nia danko, kiun ni sentas al vi por via simpatio montrita okaze de la kataklismo. Ne nur la suferantaj Tokianoj, sed ankaŭ la tuŝa nacio Japana estas kortuŝita, des pli ke ni vidis sinceran fratecon de ĉiuj popoloj sur la ter-globo.

“Vi indulgos nin pri tio, ke ni ne pli frue prezentis al vi nian dank-esprimon, malgraŭ tio, ke tion ni tre volis, ĉar bedaŭrinde Tokianoj ankoraŭ ne revenas en ekvilibrantan stacion, tro okupitaj por prepari kontraŭ la minacanta vintro, krome de la ekzistanta malfacilaĵoj.

“Ni, junaj studentoj, do komencis kolektadon de subskriboj de la dankantaj urbanejoj. Ni metis en ĉiuj stratoj de Tokio tablojn, por ke ĉiuj preterpasantoj subskribu. Laboristo trenanta ĉareton venas, ekhaltas prenas plumon, dirante: ‘Transdonu mian koran dankon al eksterlandaj amikoj.’ Homo sub peza ŝarĝo sinklinas super la papero. ‘Mi, mi, ankaŭ mi!’ pepas senkulpaj infanoj. Sinjoro en aŭtomobilo interrompas la veturon kaj subskribas kune kun ŝofuro. Ĉiuj kun emocia dankemo.

Pro la natura mizero kaŭzita ni ne povis havi pli bonan aranĝon. Literaturaĵoj kurantaj, paperoj malpuraj, sed en ĉiu literaturaĵo vi legos la plej puran koran dankemon. La tiel ricevitajn paperojn ni divide dissendas al multaj landoj, po malmulte da folioj al ĉiu.

Ĉiu amiko de la mondo volu akcepti tiun ĉi leteron, portantan la subskribojn de la dankantoj.”

HALL'S BOOK STORE

'Phone : Windsor 6081.

Books and Music bought at your home.

Specialist in Secondhand School and College Books.

Secondhand Music.

264 CHAPEL STREET,

— PRAHRAN —

(Opposite Town Hall).

Libraries Valued.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for “LA SUDA KRUCO.”

LETERO EL JAPANUJO.

Sinjoro J. A. Brailsford, nia konata kaj agema samideano, skribas:

En la lasta tago de aŭgusto la Esperantistoj de Japanujo havis kongreson en Okayama-urbo. Mi havis la plezuron ĉeesti. Mi rimarkis, ke la anoj donis speciale koran aplaŭdon al la delegito el Koreo, sinjoro Sin, kiu tre bone parolis, laŭdante la klopodon de Japanaj Esperantistoj en Koreo. Ŝajnis al mi, ke tie ni havas veran komprenon recipokan kaj veran amikecon. Poste oni diris al mi, ke la Japanaj samideanoj helpis al sinjoro Sin, kiam li havis malfacilojn kun la regnaj oficistoj, kaj ili ebligis lin reveni al sia hejmo. En tia amikeco kaj helpo mi pensis vidi semon de la internacia amikeco de l'estonteco, kiam ĉiuj homoj interkomprenos sin per internacia lingvo.

Mi antaŭe diris, ke tiu kongreso okazis la lastan tagon de aŭgusto. La sekvantan tagon okazis la tertremo. Mi devis iri tuj rapide al Yokohama. Kaj kion mi trovis tie? Ne nur katastrofo de naturo, sed ankaŭ katastrofo de malamikeco inter Japanoj kaj Koreanoj. Pri tio mi ne intencas kulpigi iun. Nur mi volis diri, ke mi nepre pensis, kiom tio diferencas de la bonkora interrilato, kiun mi vidis en Okayama. Ĉu ne estis klare, ke la terura malamikeco kaj sangverŝado kaj mortigado en Yokohama kaj Tokyo fariĝis multe parte pro la manko de tiu interkompreno de lingvo, kiu unuigis la Japanojn kaj Koreanojn en la kongreso de Okayama?

Ankaŭ mi vidis dum la katastrofo multe da malkompreno inter Japanoj kaj ilandanoj. Mi mem kore admiris la klopodojn de ambaŭ por la suferantaj, senhejmaj homoj. Sed inter ili, kiuj klopodis la saman bonan laboron de helpo por la viktimoj de la terura tertremo, mi trovis malfeliĉan suspekton kaj malfacilon. Tio eliris, mi pensis, preskaŭ tute el malkompreno. Ne nur estis malkompreno de lingvo, sed ankaŭ

de la metodoj doni helpon. Sed, rigardante tion, mi demandis al mi, ĉu povas fariĝi vera internacia helpo en katastrofo sen internacia lingvo? Mi tre admiris la laboron de la Usonaj militŝipoj, kiuj helpis ĉiujn homojn de kiu ajn nacio. Sed tia ŝipo, konstruita ne por savi homojn, sed por detrui ilin, certe estis nekonvena. Pro kio la homoj ne havas internacian organizon por helpo en granda katastrofo, kiel oni havas fajrobrigadon por savi domojn kaj homojn el brulego? Pro kio? Unue, oni ne povas havi tian internacian helporganizon, ĉar mankas internacia lingvo...

Nia lingvo Esperanto nun estas nur malgrandega semo en kamparo de suspekto. Sed mi havas esperon, ke ĝi kreskiĝos bela kaj granda arbo donanta al la homaro la dolĉan frukton de interkompreno, kiu helpos ĝin antaŭeniri sur la vojo de paco, de reciproka fido, de amikeco.

LA LIGO DE NACIOJ ESTAS KULTURBEZONO.

De D-ro Aleksandro Giesswein.

Grandan sensacion faris antaŭ kelkaj jaroj la libro de germana scienculo, al kiu li donis la iom fataliste sonantan titolon: "La subiro de okcidentujo."* La verka de Osvaldo Spengler entenas profundajn enrigardojn en la estiĝon de homa kulturo, li trovas analogiojn inter la plej diversaj teritorioj de l'spirita vivo, liaj komparoj surprizas per ilia kuraĝo kaj instigas al plua pensado kaj meditado. Sed unu el liaj komparoj estas por la moderna homo certe io tute senkonsola. Ĝi estas la konstato, ke nia hodiaŭa kulturo estas nur la forvelkanta grizulaĝo de kulturtipo. Ĉi tiu ja povas plezurigi per tre belaj junecrememoroj, ĝi regis en sia viraĝo kun forto kaj energio super mondoj—sed baldaŭ elfalos el ĝiaj malfortiĝintaj manoj la secp-

THE - CHOCOLATE - BOWL

18 Centreway

Collins Street, Melbourne

'Phone 2210

Best quality Chocolates, Nougats, Fudges, Marshmallows, Candies,
4, 5 and 6 oz., 1/-.

Fancy Boxes, 10/- upwards.

Aĉetu de Samideano!

tro—ĝin atendas espereble bela, ne tro malproksima morto.

La komparo estas tre sprita sed ankaŭ malkuraĝige senkonsola. Sed mi trovas en la libro de Spengler ankaŭ alian analogion de kulturevoluo. La diversaj fazoj de kulturvivo interŝanĝiĝas kiel la kvar sezonoj. Post la flordonaca printempo venas la rikolton portanta somero, poste la fruktojn maturiganta aŭtuno kaj la neĝ- kaj glacio kovrita vintr-o. Tamen la lasta ne estas la fino, sed ĝi kaŝas sub sia neĝkovrilo jam la ĝermojn de nova vivo.

La eŭropa kulturo troviĝas sendube en kriza fazo. Ĉu ĉi tiu krizo estas la senileco (grizuleco) aŭ la vintra dormo? Jen la demando, kiu tuŝas la koron de ĉiu kulturhomo. Se ni vidas simptomojn, ke sub la vintra kovrilo jam ekzistas ĝermoj de nova vivo, tiam revenos, kvankam per hezitantaj paŝoj, la printempo kun siaj galantoj, primoloj, ranunkoloj, violoj, alaŭdkanto kaj najtingaltriloj kaj kun la harmonio de l'bela naturo.

Por esti kapablaj ĝuste juŝi, ni devas antaŭ ĉio konstati, de kie venis efektive nia krizo. Kaj nun ŝajnas al mi, ke mi apenaŭ eraras opiniante, ke ĝia ĉefa kaŭzo estas, ke niaj juraj institucioj kaj ŝtataj organizoj ne iris egalpaŝe kun la giganta prosperado de interkomunikado kaj tekniko. Ni havis internacian komunikon, internacian komercon kaj internacian mastrumadon—sed ni ne havis ankoraŭ juran internacian organizon de ŝtatoj kaj popoloj. Nia ĉemia tekniko povas fabriki eksplodmaterialon en tia kvanto per kiom oni povus duonon de l'mondo ĵetegi en ruinojn, sed niaj juraj institucioj ankoraŭ ne sukcesis for igi la internaciajn disputojn kaj malpacojn per procesa maniero. Kaj ĝuste ĉi tio estas la granda problemo de l'tago. En la interpopola vivo devas esti rez-tarigata la ekvilibro inter la materiala kaj spirita progreso.

Nia epoko eksterordinare akcelis la evoluon de nacia spirito, de popola konscio, kaj tio estis progressa mova-

do; eniris ja ankaŭ en la lasta tempo nacioj el la tuta malkonateco en la eŭropan popolfamilion, kaj tion mi konsideras kiel pliriĉigon de l'spirita vivo de la homaro, supoze ke je alia flanko estas sufiĉe flegata la ideo de l'unueco de popoloj kaj homaj gentoj. Orkestro estas des pli grandioza, ju pli da instrumentoj kunagas, sed se ili ne akordiĝas—tiam gardu nin Dio je ĝi! Ankaŭ la multe-diverseco de nacioj estas nur tiam bona, kiam regas inter ili harmonio. Krei ĉi tiun harmonion inter la popoloj, organizi interŝtatan juron, tio estas la plej grava kulturproblemo de nia vivo, kion solvi destinata estas la Ligo de Nacioj.

Sen idealismo ĉi tiu pleje reala laboro ne progresos. Ĉar ĉiu popolkaj ŝtat-vivo estas ja samtempe trapenetrata de iom da idealismo, kiu ja efektive direktas la kulturmondon, kies helpon ja ankaŭ la realpolitikistoj uzis kaj trouzis, por inciti la popolojn unu-n kontraŭ la alia. Ni volas nun funkciigi ĉi tiun idealismon, por alproksimiĝi al la plej altaj celoj de l'homaro. Ekzistas idealoj kies plejperfektecon oni neniam atingos; kaj tia povas eventuale esti ankaŭ la absoluta harmonio inter popoloj kaj ŝtatoj, sed ve al la homaro, se ĝi deflankiĝos en la malan direkton. Tio estus la rekta vojo al barbareco. Pro tio ni volas kun plena sindono kaj ideala entuziasmo flegi la ĝermon, kiu promesas al ni en la naciliga ideo reviviĝon de nia kulturo.

*O. Spengler, Untergang des Abendlandes.

LA SEKA HARINGO.

Estis granda muro blanka—nuda, nuda, nuda,
Kontraŭ la muro skabelego — alta, alta, alta,
Kaj sur la tero seka haringo — seka, seka, seka.

Li venas, tenante en siaj manoj — nigraj, nigraj, nigraj,
Martelon pezan, grandan najlon —

PHILLIP ISLAND

“Redcliffs,” Newhaven.

The Ideal Tourist Resort.

6 hrs. from Melb. by boat and rail.

Accommodation for 50 Guests.

—First Class Table.—

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

M^r. E. S. BIGELOW, “Redcliffs,” NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

pintan, pintan, pintan,
Volajegon da ŝnureto — dikan, di-
kan, dikan.

Supreniras tiam skabelegon — altan,
altan, altan,

Kaj trapuŝas la pintan najlon — tok,
tok, tok,

Kiom eble alte en la grandan muron
— nudan, nudan, nudan.

Li ellasas la martelon — kiu falas,
falas, falas,

Al najlo alligas ŝnureton — longan,
longan, longan,

Kaj ĉe l' fino pendigas haringon —
sekan, sekan, sekan.

Remalsupreniras skabelegon — al-
tan, altan, altan,

Forportas ĝin kun la martelo —
peza, peza, peza,

Kaj poste iras aliloken — foren,
foren, foren.

Kaj de tiam, la seka haringo — seka,
seka, seka,

Ekstreme de tiu ŝnureto — longa,
longa, longa,

Malrapide balanciĝas — ĉiam, ĉiam,
ĉiam.

Mi verkis tiun fabelon — simplan,
simplan, simplan,

Por furiozigi la homojn — gravajn,
gravajn, gravajn,

Kaj amuzi la infanojn — etajn,
etajn, etajn.

El la Franca de Charles Cros,
Esperantigis H. M.

EN DISTRIKTA JUG'EJO.

Parolado de la kulpigisto.

Sinjoroj juĝistoj kaj sinjoroj ĵur-
intoj!

Mia parolo estos tre mallonga, ĉar
ĉiuj kulpigoj estas tre klaraj kaj es-
tos superflue aligi ion. Mi diros sole,
ke apud vi staras malofta tipo de
krimulo. Korpiĝo de ĉiuj malvirtoj!
Li havas nenion homan! Li estas ia
sovaĝa besto! Li estas ŝakalo, kiu
nun verŝos krokodilajn larmojn.
Venenema serpento. Vulturo! Ĉio,
kion vi volas, sed ne homo! Li do
pagu pro sia besteco per ĉiama pun-
laboro!

Parolado de la defendanto.

Sinjoroj juĝistoj! Sinjoroj ĵurintoj!

Jes, la kulpigato estas unu besto,
sed neniel sovaĝa. Li estas ŝafino,
kiun pli kuraĝaj ŝafoj igis krimi! Li
estas "kapro pekportulo"! Vi rigardu
lin: ĉu li ne similas ĉasatan leporon!

Sola rigardo de liaj bovidaj okuloj
alvokegas malseverecon! Kompatu
lin!

Parolado de la juĝato.

Sinjoroj juĝistoj! Sinjoroj ĵurintoj!
Se vi aljuĝos min al ia puno, pro
epitetoj de sinjoro kulpigisto kaj mia
defendanto, mi blendos al societo por
protektado de bestoj.

El la rusa lingvo tradukis: Veno.

LA KOMEDIO DE LA "VORTOJ SIMPLAJ."

(Polica Komisar kaj S'telisto).

— Kia estas via profesio?

— Ia. Mi havas tian profesion,
kian vi volas; ĉia profesio konvenas
al mi. Sekve mi havas nenian pro-
fesion.

— Kial vi ŝtelis tiun ĉi monujon?

— Ial. Mi havis nenion por fari,
tial mi ŝtelis; ĉial . . . aŭ nenial.

— Kiam vi ŝtelis la monujon?

— Iam. Tiam, kiam la momento
taŭgis; ĉiam mi elektas la ĝustan
momenton. Neniam mi rapidas.

— Kie vi loĝas?

— Ie; tie ĉi, tie; ĉie kaj nenie.

— Kiel vi agis por . . .

— Iel. Tiel, kiel mi povis; ĉiel
kiel vi supozos Sed neniel sen lerte-
co.

— Kies estas la monujo?

— Ies. Ties trovata de vi; ĉies . . .
kaj nenies serĉu!

— Kio estis en la monujo?

— Estis io; kio? mi ne diros: tio
ĉio aŭ nenio.

— Kiom da mono estis en la monu-
jo?

— Iom da ora mono. Ne tiom,
kiom mi esperis. Sed ĉiom estas en
ĝi; neniom malaperis.

— Kiu do timigos vin?

Eble iu, sed ne vi. Tiu estos lertulo;
ĉiu admiros lin; neniu superos.

— Malbenita raso! . . .

— Raso utila por via komisara
moŝto.

— Silentu!

— Tiom pli bone; mi pripensos la
homan sendankecon . . .

— (Kune) Kompatiga! kompatiga!

F. DURIEUX,
Lille (Francujo).

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 2a de aprilo ni ricevis la jenajn sumojn: Cole's Book Arcade, 15/-, aŭgusto '24; Berwick Esperanto-Grupo, 2/9, aŭgusto '24; J. F. Hills, 4/6, aŭgusto '24; L. W. Saw, 5/6; Redcliffs, 15/-, julio '24; H. Pudney, 4/6, januaro '25; O. K. Sperling, 5/3, januaro '25; Hyde Dun, 4/6, aprilo '25; C. Kidd, 9/-, junio '25; C. Proctor, 4/6, januaro '25; kontantaj, 3/4.

GAZETOJ RICEVITAJ.

France-Esperanto, n-ro 48. Hungara Esperantisto, jan. British Esperantist, n-roj 227, 228 (koncizaj informoj pri la movado en Anglujo). Literaturo, n-ro 20. International Language, n-ro 1. Litova Stelo, sept., jan., (aktualaj artikoloj pri Litova regno kaj ĝiaj rilatoj kun aliaj landaj; interalie, propono pri unuiĝo de Baltaj respublikoj: Latvuj, Litovujo kaj Estonujo). Bulgara Esperantisto, jan. Itala Esperanto-Revuo, okt., nov., dec., jan. (kun kalendaro) (bonaj literaturaĵoj kaj recenzoj; tamen troa uzado de vortoj nekompreneblaj al ne-Italaj; ekz: "omaĝe"). Belga Esperantisto, nov. -dec. La Interligilo de l' P. -T. -T., feb., (praktika, ne tre bonstila; informoj pri poŝt-, telegraf- kaj telefon-istaferoj de laborista vidpunkto, el ĉiuj mondpartoj). Volkspiegel, n-roj 1, 2, (Germanlingva; redaktata ne en, sed per Esperanto. Laborista). Kristana Espero, n-roj 5-6. Amerika Esperantisto, dec. Esperantista Junularo, n-ro 15. Inform-servo de la Internacia Labora Oficejo, sep cirkuleroj en Esperanto. Progress, (Melburno), marto. Le Monde Esperantiste, majo-dec. ("universala organo absolute sendependa"; ĉefe en Franca lingvo. Atakas ĉiujn kaj ĉion; oni povus eĉ kredi ĝin kontraŭesperanta). XVI-a Universala Kongreso de Esperanto, invitilo, ilus-

trita. Katolika Mondo, jan. -feb. La Espero (Stokholm), nov. -dec. Sen-nacieca Revuo, kun literatur-sciencia aldono, feb. (Komunista. Bone redaktata. Kondamnas kiel "burĝajn" kaj evitotajn de ĉiu vera komunisto presau ĉiujn esperanto-societojn -kongresojn kaj -gazetojn, inter ili kredeble "La Suda Kruc"o"-n. Sed ĉu tiu ekskluzivismo mem ne estas iom "burĝa"?). Esperanto Triumfonta, n-roj 116, 127, 170, 172, 176, 177, 178, 179. La Verda Ombro, jan.

SONG'O.

En sonĝo mi vidis plugiston: "Mem zorgu pri l'pano,"
Li diris, "mem plugu, mi ne plu dis-
ŝutos la semon."
—"Ekteksu mem!" diris teksisto, "mi
sentas dormemon."
Kaj la masonisto: "Nun prenu la tru-
lon en mano!"

Lasite de l'homoj, post tiu terura
admono,
Mi trenis post mi la malbenon kaj
la anatemon;
Kaj kiam mi preĝis por peti la
Dikompatemon,
Stariĝis, je ĉiu angulo de vojo,
leono . . . —

Mi frotis l'okulojn, dubante pri
l'nova taglumo:
La greno ekĝermis, maŝinoj teksadis
kun zomo
Kaj la domfaristoj laboris kun gaja
fervoro.

Mi, plena de ĝojo, komprenis el
tiaj memoroj,
Ke eĉ fierulo ne vivus sen homaj
laboroj:
De tiam la tutan homaron mi amis
el koro.

El la Franca de Sully-Prudhomme
tradukis D-ro G. Philippet.

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name
among the Esperantists of the world.
Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen,
224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-
bourne.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and ner-
vous exhaustion and disorders. . .
See testimonials.

For Children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Australian Agent: A. R. Cohen,
224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-

Would any person learning Esperanto and desirous of obtaining correspondents please write to Charles J. Martin, "Errol," Balldale, N.S.W.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A. (Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vicprezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Chambers, 350 Little Collins-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro E. Chalice, poŝta adreso: Good-str., Murrumbeena. Kunvenejo: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo. Prezidanto, S-ro Alfred Gregory. Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejo: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro Blundy. Sekretario, F-ino L. M. Irwin. Kunvenejo kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl-str.; Murrumbeena, (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Malvern Girls' Club"-Grupo. Prezidantino: fraŭlino N. L. Byatt. Sekretario: fraŭlino A. Midsley. Kunvenejo kaj poŝta adreso: 117 Glenferrie-Road, Malvern, marde je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro C. Casey, Sekretario, F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str.; Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo, James-str: School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretario: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejo: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretario, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.